

Subtenleteroj de kandidatoj por Komitatano B

2024-2026 Junio

Subteno de Manuela Burghelea por Jonathan Loïc Schneider

Estimataj,

Per ĉi tiu letero mi esprimas mian fortan subtenon al la kandidatiĝo de Jonathan Schneider por Komitatano B.

Mi konatiĝis kun Jonathan dum la pandemio, kiam li estis volontulo en Tuluzo kaj multe aktivis en la reta Esperantujo. Mi ankaŭ konas lin pro iama kolegeco en la Komitato de TEJO kaj ankaŭ en seminario de TEJO pri lingvoj kaj demokratio.

Jonathan estas sperta kaj dediĉita esperantisto, kun transnacia perspektivo kaj interesiĝo pri novaj manieroj antaŭenigi Esperanton. Liaj laboremo kaj honesteco, same kiel lia entreprenema kaj novigema pensmaniero, konsistigos tre valoran kontribuon por la Komitato.

Amike,

Manuela Burghelea

Subteno de Albert Stalin Garrido por Jonathan Loïc Schneider

Mi, Albert Stalin Garrido, individua membro de TEJO en 2024, oficiale esprimas mian subtenon al Jonathan Loïc Schneider, kiu kandidatiĝas por la posteno Komitatano B por la oficperiodo 2024-2026.

Kiel mem komitatano, mi firme kredas je lia kapablo plenumi la postulojn de la posteno kontentige kaj je lia potencialo esti bona kunlaboranto en la Komitato de TEJO.

Subteno de Michael Boris Mandirola por Jonathan Loïc Schneider

mi plene subtenas la kandidatiĝon de nia samideano Jonathan SCHNEIDER por la posteno de TEJO-komitatano B.

Mi havis okazon konatiĝi kun Jonathan dum lia volontulado ĉe la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo kie li jam pruvis sian entuziasmon kaj profundan koran konvinkiĝon pri Esperanto.

Mi kredas ke la TEJO-komitataj diskutoj kaj planoj povus profiti je la junulareca modernigema kaj evoluigema aliro de Jonathan, samkiel de lia alekstera atentemo kaj ambicio.

Ĉi tiu mandato estu ankaŭ prepara sperto por Jonathan perspektive al esperinda pli ampleksa TEJO-engaĝiĝo de junulo kun ankoraŭ multe da TEJO-jaroj antaŭ si.

Subteno de Michael Vrazitulis por Jonathan Loïc Schneider

Saluton,

per tiu ĉi subtenletero, mi proponas Jonathan SCHNEIDER kiel komitatanon B de TEJO por la mandato 2024-2026.

Amike,

Michael VRAZITULIS

Subteno de David Ruis-Sanchez por Jonathan Loïc Schneider

Karaj legantoj,

Mi skribas ĉi tiun subtenleteron, el individua kaj persona vidpunkto, por montrigi mian oficialan apogon pri la kandidatiĝo de Jonathan Schneider, aktivulo de TEJO el Francio, por esti parto de la Komitato de TEJO kiel Komitatano B, reprezentante la individuajn membrojn de nia organizo.

Jonathan montris diligentan intereson pri plifortigi la Esperantan socion ne nur nacinivele sed internacinivele, estante aktiva en ambaŭ niveloj dum longa tempo. Aldone, lia intereso pri la interna aktivado de la organizo estis atentigita ne nur de mi sed ankaŭ de aliaj aktivuloj en TEJO.

Mi esperas, ke dum la venontaj monatoj li estos [aŭtomate tranĉita]